

## LA GRAMATIKA STRUKTURO DE LA ANGLA LINGVO KOMPARE KUN TIU DE ESPERANTO

de Prof. D-ro W. E. COLLINSON

Prelego en Internacia Somera Universitato, Bournemouth, 1949

Ĉar nia kongreso en ĉi tiu jaro kunvenas sur angla tero, decas ke ni iom konsideru la lingvon, kiun ni aŭdas ĉirkaŭe. Efektive estas peninde studi kelkajn trajtojn de la angla lingvo kaj kompari ilin kun tiuj de aliaj eŭropaj kulturlingvoj — kaj kun Esperanto.

En artikolo, kiu aperis antaŭ du jaroj en amerika revuo, kompetenta usona lingvosciencisto — prof. Whorf, bedaŭrinde mortinta antaŭnelonge — esprimis la opinion, ke la angla lingvo meritas la titolon *aberrant*, t.s. en Esperanto *aberacia*, se oni permesas la transprenon de fakterminoj el astronomio kaj optiko. En ĉi tiu mallonga prelego mi provos montri al vi en kiaj rilatoj mia gepatra lingvo deflankiĝas de la lingvoj de la kontinento. Mia traktado estas kompreneble tre skizema kaj aludema, kaj mi povas nur atentigi vin, kvazaŭ el alte fluganta aeroplano, pri la plej imponaj lingvaj konturoj. Ni komencu per la sonoj kaj poste observu la gramatikan strukturon kaj vortfaradon.

Lernante la anglan, alilandano baldaŭ renkontas grandajn malfacilaĵojn en niaj *fonemoj*, t.e. signifperantaj distingeblaj lingvosonoj. La frikativoj *p*, kaj *q*<sup>1)</sup> ne okazas ofte en Eŭropo — la nov-islanda ankorau posedas *ping*, male ke aliaj teŭtonaj (ĝermanaj) lingvoj ŝanĝis *p* en *d* (germana, holanda *Ding*) aŭ *t* (norvega *ting*), krome la hispana konas *p*-sonon skribitan per *c* aŭ *z*, sed prononcata kutime inter, sed ne post la dentoj. Tia *p* estas antikvaĵo, heredita el la prateŭtona tempo, kiel ankaŭ nia duone vokala prononco de *w* (ŭo) en *wind*, *water* kaj de *wh* en *white* en multaj regionoj. La aliaj lingvoj uzas *v*, kiu estas lip-denta konsonanto, ekzemple, germana *Wind*, *Wasser*, *weiss* kun sudgermana varianto prononcata per la du lipoj. La angla konservas ĉe la vortfino la konsonantojn *b*, *d*, *g* kun voĉtono, ekzemple *crab*, *bed*, *dig* kontraste al la germana kaj nederlanda senvoĉigo, sed paralele al la norvega *krabb*, *ladd*, *dag*. Inter la vokaloj ni havas du-tri fenomenojn diverĝemajn. Mankas al la aliaj lingvoj la anglaj vokaloj *æ* en *hat*, *bad* — kvankam la norvega antaŭ *r* en *være* kaj la finna en *Setälä* estas sufiĉe proksimaj al nia sono — plue la prononco *cut*, *hut* sen liprondigo, kaj la mezlanga malalta vokalo en *bird*. La longaj vo-

<sup>1)</sup> Respektive la senvoĉa kaj la kunvoĉa **th** de la angla lingvo el *thing* kaj *the*.

kaloj, precipe *e* kaj *o* en *fate* kaj *no* ofte distreniĝas en la diftongojn *ej* kaj *oŭ*, sed la simplaj vokaloj estas akcepteblaj kaj, ĉiuokaze, ŝataj de la skotoj, do mi malkonsilas, ke oni tro diftongigu ilin — nia plej taŭga fonetikisto, Daniel Jones, konstatis eĉ en Sudanglujo emon uzi la simplajn vokalojn. Rilate al la vortkunligo, la *liaison*, la eŭropaj lingvoj tre malsamas inter si. La franca kungluas tutan serion da vortoj en *un grand homme, il s'en est allé*; la germanoj de la norda regiono uzas glotan plosivon en *eine alte Amme*. En la angla ni ofte montras la kunligejon inter du vokaloj, se la unua estas nepreciza murmurvokalo (a) per *r*, ekzemple *India r Office*, kion multaj kondamnas, tamen uzas — interese estas kompari la *Ludwigslied* en la germana de la 9-a jarcento kun *wola r abur* (*wohl aber*). Tiu poemo montras krome alian fenomenon kiu nuntempe karakterizas la vulgaran prononcon de la angla, la aldonon de la spirato *h* antaŭ la komenca vokalo, *heigun* por *eigun* kiel la *cockney* en Anglujo diras *hoffice* kaj kompanse forlasas *h* en *'ouse*. Antaŭ ol forlasi la kampon de la fonetiko ni ĵetu rapidan rigardon al la fortakcento. Tipe angla ŝajnas al mi la duobla aŭ ŝveba akcento sur kelkaj kunmetitaj vortoj kaj sur certaj vortgrupoj, ekzemple *'plum-pudding*, *'sea'side*, *'arm'chair*, *'Christmas'present* kaj oni ofte aŭdas *'good after'noon*. Tiu ŝvebakcento kaj la iom *flagretanta* intonacio de la sudangloj ne estas facile akireblaj.

Venante nun al la studo de signifaj formoj, t.e. vortoj, vortgrupoj kaj frazoj, mi ne bezonas memorigi al vi, ke la angla lingvo ĝuas la reputacion havi treege simplan gramatikon! Unuavide ĝi aspektas eksterordinare asketa, ĝi montras muskolojn sed ne multe da graso. Tre facile oni transiras de unu vortklaso al alia sen modifoj. Ni prenu kiel ekzemplon la radikvorton *black* (nigr-). Oni povas diri ne nur *a black look* (kolera rigardo) sed ankaŭ adverbe *he looked black* (li rigardis kolere); ne nur *a black spot on one's nose* (nigra makulo sur ies nazo) sed ankaŭ *a black* (nigraĵo, nigrulo); ne nur *black shoes* (nigraj ŝuoj), sed ankaŭ *he blacked my shoes* (li ciris miajn ŝuojn), *he blacked my eye* (li kontuzis al mi la okulon). En Esperanto ni sisteme distingas per karakterizaj finaĵoj tiujn kvar vortklasojn, sed kun tiom da reguleco, ke angla lerneja inspektoro iam diris, ke por la anglaj lernantoj la gramatiko de Esperanto estas kvazaŭ analizado per kolorkraĵoj tia, kia antaŭe estis uzata en niaj lernejoj. Efektive, se lingvo perdas siajn fleksiojn, ĝi devas iel kompensi; la konto devas esti saldata. Ni konsideru vorton rigardatan fundamente kiel adjektivo, ekzemple *good* (bona). Se ni uzas la vorton kun artikolo izole *the good*, ni havas la ekvivalenton de la latina kaj greka neŭtraj formoj *bonum*, *to agathon*, sed rimarku ke ni povas krome uzi *the good* kun plurala verbo *the good are worthy of reward* (la bonaj homoj — la bonuloj — meritas rekompencan). Se ni tamen havas situacion postulantantan elekton el in-

ter objektoj, ni ofte uzas la apogvorteton — Jespersen nomas ĝin *prop-word* — *one* (pluralo *ones*), ekzemple *which one/ones do you chose?* (kiun/kiujn el tiuj vi elektas?) kun la respondo *this one, every one, the big one, the black ones*<sup>2)</sup> (ĉi tiun, ĉiun, la grandan, la nigrajn). Partan paralelon ni trovas en la ununombro en la skandinavaj lingvoj, norvege *en liten en* — *a little one* (ankaŭ por *infaneto*, kutime por persono). La keltaj lingvoj havas ion similan, ekzemple, en la kimra parola lingvo *prun? which one? (kiu?)*; *un wâg, an empty one* (iu malplena), kaj eĉ pluralformo *rhai*, ekzemple *hwyr oedd yr unig rhai yn y chapel, they were the only ones in the chapel* — frazo en kiu Esperanto povas distingi *ones* per la plurala finaĵo, *la solaj en la kapelo*.

Ofte estas tre malfacile determini en la angla ĉu vorto estas substantivo aŭ adjektivo — pro tio la tiel nomita *theory of the ranks* (la teorio de gramatikaj rangoj) formulita de Jespersen povas esti tre utila. Jen estas kelkaj ekzemploj de la uzo de vorto, kiu norme estas substantivo, en epiteta (atributiva) kaj predikativa funkcio. *Period* (periodo) estas kutime substantivo, laŭ Jespersen en vortgrupoj kiaj *in this period* aŭ *the period was important* unuaranga, sed nuntempe ni havas la modan uzon de *period* en *she is rather period, a period room*, kie en Esperanto oni elektus la a-finaĵon, nome tiun de la dua rango. Aliaj ekzemploj: *he is top/bottom in his class* (li estas ĉe la supro/mal-supro en sia klaso), *the top boy* (la suprulo), *a bumper* aŭ *record harvest* (abunda aŭ rekorda rikolto), *a milk and water speech* (senverva parolado), *she's not exactly top drawer* (ŝi ne estas el la elito), *kid-glove methods* (traktado kun gantoj), *that's very middle-class* (tio estas tre burĝa), *is he council or secondary?* (ĉu li estas popollerneja aŭ dua-grada), *a baby grand* (fortepianeto), *a baby Austin* (popol-Austin — fabrikmanko de aŭto), *the play was wizard* (la teatraĵo estis elstare bona), *an Oxford accent* (oksforda parolmaniero). Ni povas eĉ uzi epitete vortojn de la tria rango, ekzemple *the then king* (la tiama reĝo), *a nearby restaurant* (apuda restoracio), *the up train* (la alĉefurba trajno), *down train* (deĉefurba trajno).

Escepte en la pronomoj la angla lingvo ne distingas kazojn. La substantivoj havas komunan kazon kaj genitivan aŭ posedan formon: *whose book?* (kies libro?), *John's book* (la libro de Johano), *the men's books* (la libroj de la viroj). Por kompensi tiun mankon la vortordo nepre estas reguligita, ĉar oni volas diferencigi *la kato mordas la hundon* kaj *la katon mordas la hundon*. Iom patose ni povas antaŭmeti la objektivon aŭ celvorton, ekzemple, *that man my father does not trust*

<sup>2)</sup> Eĉ en la anglosaksa epoko oni uzis *each one*, en la mezangla Chaucer uzis *a lusty one* (gajulo) kaj alia poeto eĉ substantivon *a master one*.

(tiun homon mia patro ne fidas); male en *that man does not trust my father, that man* estas subjekto. Plua komplikaĵo! Se ni diras seninterrompe kaj senpaŭze kun leviganta intonacio *that man my father does not trust .....*, ni komprenas ĝin kiel relativan subfrazon kun forlaso de la relativo, kiel en la skandinavaj lingvoj, ekzemple norvege: *den mann min far ikke tror*, en kiu krome la pozicio de *ikke* markas la subfrazon. Estas notinde, ke en bone edukitaj rondoj la uzo de la oblikva aŭ objekta kazo *whom* (kiun) plioftiĝas pro tio, ke oni volas klare esprimi la celon, kvankam la finaĵo ne estas necesa por signifdistingo, ĉar *kiun vi vidas* havas kiel ekivalenton *who* aŭ *whom did you see?* Male *kiu vin vidis?* tradukiĝas per *who saw you?*

Inter la pronomoj kaj parencaj adjektivoj la kontinentano trovas malfacila diferencigi *some* kaj *any*, precipe en demanda frazo. *Some* rilatas al iu specifa individuo, ne nomata kaj eble eĉ nekonata. Kiam ni demandas *did someone come this morning?* ni antaŭsupozas pro la cirkonstancoj aŭ pro la aperoj, ke efektive specifa persono venis. Se ni demandas *did anyone come this morning?* ni tute ne esprimas opinion aŭ atendon, ni estas neŭtralaj kaj tute nedeciditaj. *Some* specifikas sennome, *any* ĝeneraligas transnome: *someone did it* (iu faris ĝin), *anyone can do it* (iu ajn/ĉiu ajn povas fari ĝin). *Take something for your cold* — *Take anything for your cold as long as you stop grumbling* montras, ke *some* indikas kaŝitan kondiĉon, ekzemple tiun de taŭga rimedo. Esperanto povas ofte imiti la nuancon de *any* per la aldono de *ajn*, ekzemple, *io ajn, ĉio ajn, kio ajn*.

Notinda estas ankaŭ en la angla la distingo inter duoj aŭ du-eraj grupoj kaj plur-eraj grupoj. Ni ankoraŭ distingas *either of the two* (aŭ unu aŭ la alia el la du) de *each of the three* (ĉiu el la tri), kaj kiel Esperantan *ambaŭ* ni havas la apartan vorton *both* por „ĉiuj du”. *Whether of the two* (kun kiu komparu la germanan *weder*, latinan *uter* kaj grekan *poteros*) jam eksmodiĝis, sed postvivas en la konjunkcio *whether* (ĉu).

La emo de la angla trakti aparte la du-erajn grupojn montriĝas ankaŭ en la esprimoj por simetriaĵoj objektoj konsistantaj el du partoj, ekzemple *okulvitroj* estas *a pair of spectacles, pantalono: a pair of trousers, tondilo: a pair of scissors* aŭ *shears*, ĉiuj sufiĉe fruaj prunte esprimoj el la franca, en kiu ankoraŭ troviĝas *une paire de lunettes, une paire de ciseaux*.

Pronomoj ofte plenumas la gravan funkcion ripeti, ne nomante eron jam menciitan, ekzemple, *I am vivis reĝo .....* *li estis* k.t.p., alivorte ili funkcias anafore. En kelkaj okazoj en kiuj la kontinentaj lingvoj uzas *ĝi* aŭ *tio* kiel anaforan objekton, la angla uzas *tiel*, nome *so*, ekzemple: *I hope so, fear so, suppose so, do so, tell him so, believe so* (Mi esperas tion, timas tion, supozas tion, faras tion, diras al li tion, kredas

tion) kvankam ni diras *I doubt it* (mi dubas tion) kaj forlasas la objekton en *I know, I understand* (Mi scias, Mi komprenas). Kiel la vorto jam indikas, pronomo ne nomas, ĝi anstataŭas nomon. Krom substantivo, ankaŭ aliaj vortklasoj (adjektivoj, verboj) povas indikiĝi per anaforaj substitutoj. La verbanstataŭaĵo estas *do*, ekzemple, *she dances better than her friend does* (ŝi dancas pli bone ol ŝia amikino (faras)) — ankaŭ en la skandinavaj lingvoj *gjøre* havas similan funkcion, ekzemple: *Does it matter to you whether she knows him or not? Spiller det noen rolle for Dem om hun kjenner ham eller ikke?* (Ĉu gravas al vi ĉu aŭ ne ŝi konas lin?) kun respondo *Ja, det gjør det* (Yes, it does; Jes, gravas).

En la suprecitita *ŝi dancas pli bone ol ŝia amikino*, en kiu la verbo ne estas ripetita aŭ eĉ indikita, ni havas ekzemplon de la tiel nomita *zero-process* aŭ nul-procedo. La angla havas tre interesan kaj ofte uzatan sintaksan rimedon, indiki la implicitan infinitivon per la reteno de la infinitiv-markilo *to*, forlasante la verbon mem, ekzemple, *I don't want to go, do you want to?* (Mi ne volas iri, ĉu vi volas?), *I go by tram, but it is not his habit to* (Mi iras per tramo, sed ne estas lia kutimo tiel iri), *I don't go there now, but I used to, and I hope to again soon* (Mi ne tien iras nun, sed mi antaŭe iradis, kaj mi esperas baldaŭ denove iri). Mi kredas, ke la angla staras sola kun sia sintaksa procedo, kiu montras emon similan al la aldono de *one/ones* al adjektivo *a good one* (laŭvorte: bona unu), *good ones* (bonaj unuj). En tiaj konstruoj *one* kaj la infinitiva *to* estas nur gramatikaĵoj.

Rilate al la infinitivo la angla ankaŭ en aliaj kuntekstoj iras sian propran vojon. Frazoj kiel *he was the first (last, only one) to come* (li estis la unua / lasta / unusola veninta), *he happened to pass* (okazis, ke li preterpasis) ja havas paralelon en la franca *il était le premier (dernier, seul) à venir* kaj *il vint à passer*, sed en la angla ni etendas la uzon ĝis *it is likely (apt) to rain* (verŝajne pluyos), *he is sure to succeed* (li nepre sukcesos), *I fail to understand* (mi tute ne komprenas). Kontraste, en okazoj kie post prepozicioj la kontinentaj lingvoj havas infinitivon, la angla ofte preferas uzi la gerundion finiĝantan per *-ing*, ekzemple, germana *statt (um, ohne) es zu tun*, france *au lieu de, pour, sans le faire*; la anglo diras *instead of* (anstataŭ) aŭ *without doing it* (ne farante ĝin) tamen *in order to do it, so as to do it* (por fari ĝin). La libereco kun kiu la angla konstruas vortgrupojn konsistantajn el prepozicio + gerundio, estas komparebla kun tiu de la nordaj lingvoj kie, laŭprincipe, ĉiu prepozicio povas kombiniĝi kun infinitivo, ekzemple, norvege *etter å skrive* (after writing — skribinte), *ved å skrive* (by writing — per skribado), *en følelse av å ha gått* (a feeling of having gone — sento, esti trafinta ekz. en kaptilon). Ankaŭ la keltaj lingvoj estas tre liberaj tiurilate — ofte en la kimra, konjunkcia sub-

frazo anstataŭiĝas per prepozicia infinitivgrupo, ekzemple, *er iddo ddyfod* (*in spite of his coming* — malgraŭ lia veno) por *although he came* (kvankam li venis). Almenaŭ teorie ni havas la saman rajton en Esperanto, se ni estas kontentaj uzi la verb-substantivon en *-o* aŭ *-ado*, ekzemple *malgraŭ lia veno*. Iom arbitre oni limigas en Esperanto la prepoziciojn kun infinitivo al *anstataŭ, antaŭ ol* (komparu la nederlandan *voor + te* kun infinitivo) *krom, por* kaj tre hezite *inter* kaj *sen*. La angla kuraĝas uzi la gerundian grupon eĉ kiam la subjekto de la grupo estas malsama ol tiu de la ĉefa frazo. Oni rajtas diri angle *I do not approve of you (your) going, I do not despair in spite of things being in a bad state* kie en la eŭropaj lingvoj inkluzive de Esperanto oni diras eble *mi ne aprobas (la ideon) ke vi iros, mi ne malesperas malgraŭ la fakto ke la aferoj statas malbone*. Ni observas la saman fenomenon, kiam la angla gerundio estas la rekta objekto de verbo, ekzemple, *an ointment which prevents the skin getting dry* por kiu la norvega devas diri *et fett som motvirker at huden blir tørr* kaj en Esperanto ŝmiraĵo kiu malhelpas la haŭton sekiĝi (aŭ ..... kiu malhelpas la sekiĝon de la haŭto).

Antaŭ ol forlasi la nefinitajn formojn de la verbo ni konstatas kuriozaĵon anglan en la uzo de la formulo *for me to do*. Multaj lingvoj paralelas *it is good for me to rest* (estas bone por/al mi ripozi) sed oni ne povas reordigi la frazon kiel ni povas, ekzemple, *for me to rest would be a good thing* (ripozi estus por mi bone). Efektive se oni tradukas germanen aŭ alilingven oni ofte nepre devas rifuĝi al konjunkcia subfrazo enkondukata de *ke* aŭ *se*, ekzemple, *for our plan to succeed we must work hard* (por ke nia plano sukcesu, ni devos labori forte), *I waited for the rain to stop* (mi atendis ĝis la pluvo ĉesis — aŭ ..... ke la pluvo ĉesu), *they prayed for a ship to come* (ili preĝis, ke ŝipo venu), *it is too wet for us to go out* (estas tro malseke por ni eliri — germ. *als dass wir ausgehen sollten* — en la parola lingvo: *es ist uns zu nass zum Ausgehen*). Notindaj estas krome kelkaj anglaj uzoj de la tielnomita akuzativo kun infinitivo. Oni diras ne nur *I told (ordered) him to come*, sed ankaŭ *I wish him to come, I expect him to come, I prefer him to come*, kie en Esperanto ni diras *mi deziras, (atendas, preferas), ke li venu*.

Sur la sintaksa kampo restas ankoraŭ la 'progresivaj' tempo-formoj, kiuj unuavide ŝajnas komunaj al la angla kaj esperanta lingvoj — mi celas *mi estas (estis, estos) skribanta* kaj *I am (was, shall be) writing*. Tio estas verbkonstruo, kiu troviĝas en la keltaj lingvoj, la finna, la itala, la hispana kaj portugala inter aliaj, sed nek en la franca nek en la germana. La nederlanda havas, kiel ankaŭ la mezfranka dialekto de Kolonjo, *ik ben aan 't schrijven*, kp. *ich bin am schreiben* (laŭvorte *ĉe la skribo*), kaj la novislanda uzas *eg er að skrifa*, do oni povas opinii ke

tiu sintaksa fenomeno estas tre disvastigita. Tamen se oni zorge komparas la anglajn formojn kun tiuj de la aliaj tiamaniere ke oni elmontras la kaŝitajn nuancojn, oni baldaŭ observas la apartecon de la angla konstruo. Unue mi rimarkigos kelkajn similaĵojn inter la angla kaj Esperanto. En ambaŭ lingvoj la formoj efektive ofte indikas la daŭron: jen kelkaj ekzemploj eltiritaj el la *Plena Gramatiko*: La Zamenhofa frazo *li estas mortanta — he is dying; la suno estis leviĝanta — the sun was rising; mi estos skribanta (kiam vi revenos) — I shall be writing (when you return)*. La daŭro ne havas precizajn limojn. Nur en la angla ekzistas diversaj nuancoj malkaŝantaj la emocian sintenon de la parolanto. Se mi diras *I shall go to the University to-morrow*, mi esprimas la simplan fakton, sed per *I shall be going to the University to-morrow, and so can get your letters for you*, mi indikas ke mi iros laŭ antaŭa aranĝo aŭ decido aŭ kutimo. Kelkfoje ni montras per la progresiva formo ke ni estas senpaciencaj aŭ riproĉemaj, ekz. en la fabelo *who has been eating my porridge?* (kiu estas manĝadinta mian kaĉon?) anstataŭ *who has eaten (up) my porridge?* (kiu estas (el)-manĝinta mian kaĉon?). Observu krome la diferencon inter *what did you say?* (kion vi diris?) kaj — mirigite — *what was that you were saying?* (kio etis tio, kion vi estis diranta?) kaj *I see he has come back* (mi vidas, ke li revenis) kaj *I am seeing a lot of him these days* (mi ofte vidas lin nuntempe). Tio estas kompreneble nur fragmenteto de vasta studkampo, sed eble sufiĉas por pruvi unufojon plue la diverĝemon de mia gepatra lingvo.

Rilate al vortordo unu kuriozaĵo en la angla meritas atenton: la kutimo meti adverbos, eĉ kelkfoje adverbos grupon, inter la subjekton kaj la verbon. En aliaj eŭropaj lingvoj ja troviĝas en literatura stilo la nomo de verko intermetita inter la aŭtoron kaj la verbon, ekz. *Goethe in seinem Egmont .....* (*Goethe in his Egmont .....*) sed la angla lingvo ordigas la adverbos ofte kun la libereco de Esperanto, kvankam ekzistas certaj, ne ĉiam difineblaj, limoj. Jenaj klasoj de adverbos ŝajnas favori la mezpozicion inter subjekto kaj verbo: (1) mallongaj tempadverbos, ekz. *I always write promptly* (mi ĉiam skribas senprokraste). *I hardly ever see him* (mi preskaŭ neniam vidas lin), sed nur *I saw him to-day* aŭ *to-day I saw him*, kvankam oni povas diri, esperante *mi hodiaŭ vidis lin*; (2) kelkaj adverbos de maniero, ekz. *I quickly realized* (mi rapide komprenis); (3) adverbos de grado ekz. *I much wanted to go* (mi multe volis iri); (4) emfazpartikloj, ekz. *he simply refused* (li absolute rifuzis). Oni rajtas diri ke la angla lingvo en ĉi tiu rilato laŭpraktike celas al la libereco, kiun Esperanto jam laŭprincipe atingis!

Fine mi volas fari du-tri rimarkojn pri la angla vortaro, pri la 'leksikono' kaj la rimedoj de vortfarado. Kiel parenco de la germana lingvo,

vo, la angla povas formi kunmetaĵojn ekz. *fatherland, blackbird, back-bite*, sed fakte ne favoras tiom kiom la germana tiun procedon. Ofte la limo inter vortgrupo kaj kunmetaĵo estas sufiĉe fluema, ekz. *garden suburb* (ĝarden-antaŭurbo), en kiu ni povas heziti ĉu intermeti streketon aŭ ne! Tiaj kombinoj estas — kiel ni konstatis konsiderante la akcentajn kondiĉojn — kutime tre malfirmaj. Due mi volas direkti vian atenton al la ekzisto en la angla de maksimume ĝeneraligitaj verbos, ekz. *get*. *Get in* povas esti en Esperanto aŭ *eniĝi* aŭ *eniĝi* kaj *get* sen adverbos kromvorto havas almenaŭ jenajn funkciojn (1) akiri: *I get a prize* (mi akiras premion) (2) fariĝi: *it's getting late* (malfruiĝas) (3) moviĝi: *get into the car* (enaŭtomobiliĝu!) (4) agi: *get him to come* (venigu lin); tamen por la franca *faire* ni devas distingi inter *do* kaj *make*. Aliflanke la angla *put*, france *mettre* kaj Esperante *meti* distingiĝas en la germana per *legen, stellen, setzen* kaj *tun*. Ni havas abundon da multcelaj vortos tiaj.

La angla vortaro estas pli altgrade miksitaj ol la vortaro en la pli-multo de la lingvos. Pro tio la angla parolanto ofte konas ne nur la teŭdonidan vorton, ekz. *house* (domo), *wall* (muro), *weave* (teksti), *town* (urbo), sed ankaŭ paralelan latinidan vorton, ekz. la adjektivo de 'house' estas *domestic*, de 'wall' *mural*, de 'weave' *textile*, de 'town' *urban*. Tiel ni konservas sufiĉe grandan trezoron da internaciaj radikoj kaj tio helpas kompreneble al la angla lernanto de Esperanto.

Resume ni rajtas diri, ke la angla lingvo (1) estas laŭ la fonologio 'eksterkontinenta', do malsimila al Esperanto pro la konservo de kelkaj pratempaj konsonantos kaj la evoluo de novaj vokalos ofte kun glitfinaĵos; (2) estas impone senfleksia kompare kun Esperanto, tamen ofte devas kompensi la mankon de fleksios per la provizo de sintaksaj rimedos; (3) estas kaj en vortkonstruo kaj en frazostrukturo altgrade lakona kaj ŝparema; kaj (4) havas la avantaĝon — kiu ofte povas fariĝi danĝero! — ĉerpi sian vortaron ne nur el la teŭtona baza lingvo sed ankaŭ el la latina kaj la latinidaj lingvos.

Kiel vi vidas, nia lingvo eĉ kiam ĝi estas en la tiel nomita simpligita formo de Basic English, ne estas tiel facila kiel oni unue kredas! La malfacilaĵos estas subtilaj kaj kvazaŭ subteraj, do ofte ne atenditaj. Miaopinie tiuj kvalitos batalas kontraŭ la avantaĝos por ni anglos vidi nian gepatran lingvon iĝi la oficiala internacia helplingvo. Por la anoj de tiom malsamaj lingvos Esperanto estas kaj restas la plej taŭga interkomunikilo.